
# Gazeto Andaluzia

Andaluzio por si por Hispanio kaj la Homaro

Nº 6 1-a JARKOLEKTO NOV -84

## 9-a RENKONTIĜO DE HEJS

## MALAGA 5 - 7 APRILO 1985



zeto
Andaluzia

Fondita en 1910
JOSE GARZON RUIZ.
ala Organo de A.E.U.

EDITA - ELDONAS

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Inscrita en el Registro de Asociaciones del Ministerio del Interior del Estado Español con el número 56.173

REDAKTOROJ

Alberto FRANCO RAMIREZ. Seviljo
Andrés MARTIN GONZALEZ. Malago
José Mª RODRIGUEZ HERNANDEZ. Kordovo

ENHAVO


tikolo ............. 1
noj ................ 2
re ................. 5
le la Junularo ..... 7
ĝoj ................ 8
o de AEU ........... 9
.................... 10
en Parcial ......... 11


ADRESOJ

- Grupo de Esperanto IB "Séneca"
  Apartado de Correos nº 611
  14080 CORDOBA

- Centro Cultural GFU (Esperanto)
  C/ Trinidad Grund 28, 2º
  29001 MALAGA

- Asociación Sevillana de Esperanto
  C/ Sol 75 41003 SEVILLA

- Sevilja Esperanto-Junulara Orgganizo
  C/ Pozo 3. 41003 SEVILLA

aldono nº 6 kaj abonilo.

---

inioj ĉi tie verkitaj
enas nur al la'subskri-
j"

---

oras ĉi-numere krom la redaktoroj: Julio HERRERO SEGURA.
lada ILLANES ORTEGA. Rafael PLEGUEZUELOS GONZALEZ.

Presita ĉe LA KORDOVA ESPERANTISTO

# ĈEFARTIKOLO

Ni komencas novan kaj gravan fazon de nia agado. Post la estigo de "Andaluzia Esperanto-Unuiĝo" kaj la aprobo de ĝia statuto nenio mankas por labori serioze kaj sisteme por Esperanto. Aliflanke, mi estas tute certa pri via ŝato de Esperanto kaj via sinceraj deziroj disvastigi la Internacian Lingvon. Ĝuste pro tio mi dankas al vi kaj petas valoran kunlaboron.

Sed tio, kvankam tre grava, tute ne sufiĉas. Nepras sin teni efike. Alie, okazos same kiel en la pasinto, t.e. ke kvante kaj kvalite apenaŭ antaŭeniros. Jes, mi akceptas kaj estimas niajn renkontiĝojn, mi estas fiera pri la Tendaro de HEJS, la Nacia Kongreso de HEF, la 2-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, la partopreno en la Konvencio de Verkistoj, Cenaĉero, La Kordova Esperantisto, SEJO, Gazeto Andaluzia, la definitiva integriĝo de Esperanto en la GFU de Malago, niaj kursoj, ktp. Tamen, ĉio ĉi ne sufiĉas por ke nia kara lingvo triumfu en Andaluzio. Kion faru, do?

Krom detala agadplano de AEU enhavata en la Rezolucioj de la 2-a Kongreso kaj en alia kunlaboraĵo titolita "Ĉi-Jare", mi sugestas neniam forgesu la jenon:

1) Ĉeesti niajn semajnajn kunvenojn kaj renkontiĝojn.
2) Legi ĉiutage ion en Esperanto.
3) Aŭskulti almenaŭ semajne radioelsendojn en Esperanto.
4) Kontakti la koncernajn radiostaciojn poŝtkarte.
5) Profundigi priesperantajn konojn per la legado de revuoj, libroj, k.s. rilate al Movado, Beletro, Esperantologio kaj Gramatiko.
6) Komenti niajn legadojn en niaj kunvenoj.
7) Paroli ĉiam en E-o kaj neniam krokodili.
8) Cerbumi kutime ~~almenaŭ kun du eksterlandaj samideanoj~~.
9) Korespondi almenaŭ kun du eksterlandaj samideanoj.
10) Aliĝi al iu esperanta organizo.
11) Montri sin antaŭ la proksimuloj kiel vera esperantisto.
12) Klopodi elstari ankaŭ en niaj nemovadaj agadoj.

Ĉu multe? Ĉu malmulte? Mi nur diras: NEPRE. La aŭtentika sinteno de ĉiu samideano konsistas el serioza akcepto de la teoria kaj la praktika aspektoj de la Movado. La entuziasmo admirindas se nur oni agadas respondece. La pasintan lernojaron, mi enketis la hispanan esperantistaron. El la rezultatoj atingitaj mi kvazaŭ konkludis (la nombro da respondintoj ne estis kontentiga) interalie, ke:

a) La movado ne funkcias aktive.

b) Ŝajne, abundas inter ni la esperantistoj ŝatantaj Internacian Lingvon kiel hobion. Hispana esperantistaro bezonas pliajn respondeculojn.
c) Mankas la kunlaboro.
d) Neniu ĉeestas la renkontiĝon kun la celo partopreni ekskluzive la kunsidojn.
e) Oni aŭskultas tre malofte la radioelsendojn en Esperanto.
f) Oni legas pli ol aŭskultas la radion.
g) Oni ne rajtas kulpigi la Registaron pri la malgranda influo de Esperanto en nia socio, se la esperantistaro (ni, ĉiuj) sin detenas kunlabori respondece.

Ĝuste, tial necesas enpensigi kaj kulturi nian esperantistaron. Kion opinias vi? Kion vi faros ?

Salutojn el ANDRES MARTIN.

# INFORMOJ

## KORDOVO

- La pasintan monaton Oktobro oni komenciĝis la Elementan Kurson kiu ĉiujare okazas en la Gimnazio SENECA. Ĉi-jare partoprenas kelkaj gelernantoj de la Gimnazio kaj ĉiuaĝaj personoj kiuj deziras lerni Esperanton. Oni sekvas la metodon "¿Sabe ud. Esperamto?" de Jorge HESS. En venontaj numeroj de ĉi tiu revuo ree ni informos pri la Kurso.

- Okaze de la 60-a Datreveno de la okazigo en Kordovo de la Iberia Esperanto-Renkontiĝo kaj de la 5-a datreveno de la Grupo de Esperanto IB SENECA, kaj fine de la Jarcento de la naskiĝo de la plej eminenta kordova esperantisto s-ano FRANCISCO AZORIN IZQUIERDO; nia grupo organizos dum 1985 ekspozicion pri la internacia lingvo en la Liceo SENECA, en venontaj numeroj ni pliigos la informojn. Nun ni diros ke krom la ekspozicio treeble okazos konferencoj, video-filmoj, ktp.

## MALAGO

- La 15-an de Decembro dum la tuta tago, ni havis la plezuron aŭskulti per la radio, esperantajn kanzonojn, kiujn ni havigis la radiostacioj.

- La 22-an de Decembro, okaze de la Zamenhofa datreveno, ni aranĝis ekspozicion pri libroj, revuoj, broŝuroj, esperantaĵoj, ktp.

- La 28-an de Decembro vizitis nin geedza paro el Belgio, kun kiuj ni interparolis dum proksimume 3 horoj. Poste ili vojaĝis al Granado.

- Ni komencis propagandi la kursojn por la monato Januaro, kiuj estos jenaj:
  - Elementa. Komenciĝos la 14-an kaj okazos ĉiun lundon, merkredon kaj Vendredon, je la 8-a nokte.
  - Meza: Komenciĝos la 8-an kaj estos gvidata de s-ano Julio Herrero, ĉiun mardon kaj ĵaŭdon je la 8-a nokte.
  - Vendredaj Kunvenoj: ĉiuj vendredoj kunvenos la progresintoj por parole praktiki la lingvon. La vendredon 4an, profitante la restadon inter ni de s-ano Francisko Ksavero Moleono, ni havis la ŝancon aŭdi pri Madrida Esperanto-Liceo.
  - Esperanto por infanoj: Ekde la 12a, ĉiun sabaton, s-anino Mª José Quesada gvidos kurson por infanoj.

J.H.S.

## SEVILJO

- La 26an de Januaro 1985a okazos en la urbo Lora del Río (Seviljo) renkontiĝo de seviljaj esperantistoj. La intenco estas kunigi en festa etoso la membrojn de SEJO kaj de Sevilja Esperanto Asocio, sed kiel ĉiam okazas nur SEJO-anoj ĉeestos. La intenco ĉiam estas bona sed la rezultoj eble ne. Ĉi tiu ne estas la loko por paroli pri la situacio de la fantoma ASE. Verŝajne ĉi tiu informanto verkos artikolon pri tiu temo venonte.

- "Ĉiesrevuino", la nova revuo "fanzino" de la esperanto-movado jam estas sur la strato. Ĝi celas esti komunikilo de la junulara movado en ĉiuj ĝiaj sencoj. Se vi volas aboni ĝin aŭ peti provekzempleron (kontraŭ 55 ptoj) adresu al SEJO Str. Pozo 3 41003 SEVILLA. Alie, ni informas ke "ĉiesrevuino" serĉas korespondantojn volontajn en la urboj Madrido kaj Barcelono por pli malpli periode informi pri la ĝenerala junulara etoso de tiuj urboj (muzikprezentadoj, spektakloj, kultura vivo, ktp.) Per tiaj artikoloj ni kreos novan sekcion sub la titolo " urba korbato". Interesitoj adresu al la sama adreso. In-

formcele, ni povas diri ke "ĉiesrevuino" ne estas la oficiala organo de SEJO, sed la realigo de projekto de kolektivo de membroj, kiuj decidis eldoni ĝin.

- Aliĝiloj kaj informiloj pri la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto jam estas en la presejo. Tre baldaŭ ni dissendos ilin tra tuta Andaluzio kaj Hispanio. Dum la kongreso oni povos restadi senpage en nia sidejo sur strato Pozo 3, se oni avertas sufiĉtempe, kaj se oni kunportas dormosakon! La kongresejo estos tre verŝajne Nacia Lernejo, kiu situas tre proksime de nia sidejo.

- La Prezidanto de ASE kontaktis la kulturan delegiton de la Sevilia Deputitaro, kaj tiu preskaŭ konsentis pri la eldonado de propagandiloj, broŝuroj ~~da~~ pri Esperanto, fare de la Deputitaro, simila al tiu eldonita en Valencio.

- La 31an de Januaro je la 8a horo vespere, okazos en nia sidejo sur strato Sol 75, prezentado kaj projekcio de lumbildoj fare de Luis Gilpérez Fraile sub la temo "Aventuraj Speleologiaj". Sekvos la prezentadon debatoj, diskutoj kaj intersanĝoj de vortoj pri la temo. Ne necesas diri ke la lingvo estos esperanto (eble necesas diri tion).

- En pasinta informo ni sciigs al vi pri ŝtelo en nia centro de str. Pozo 3. Pli detale ni informas vin pri tio, kion oni priŝtelis nin:

- Steran Kasedaparaton
- Normalan porteblan kasedaparaton
- Tajpilon
- Antikvan poŝhorloĝon
- Sunan Kalkulilon

Feliĉe la ŝtelistoj ne estis kulturamaj kaj ili eĉ ne tuŝis niajn librojn, informilojn, esperantaĵojn, ktp. Espereble la polico agos rapide. Tutcerte ni ne rehavos tiun materialon, kaj la subvencio elĉerpiĝas, zorgon amikoj !!

# Ĉi - jare

Se iu asertus, ke ni estas ĉirkaŭataj de gravaj problemoj, nenion inventus. Memvideble, nia agado estas limigata ĉiutage de serio da ĉiuspecaj malfacilaĵoj malhelpantaj la atingon de niaj celoj. Tamen, kaj malgraŭ ke tio evidentas, ni ne rajtas krucigi niajn brakojn kaj neniom fari. Adversaj cirkonstancoj postulas pristudon kaj pripenson. Ĉi-cele mi intencas klarigi iujn rilatajn nuanco

Unuavice, ni diru, ke ĉiu rezultato postulas adekvatan kaŭzon. La faktoj, kvankam foje oni jesas inverse, neniam aperas hazarde. Oni povas diri ke io okazas nevolonte, aŭ nekonscie, sed n eniel ke io okazas senkaŭze. Alivorte, estas vere, ke se ni estus antaŭviditaj la kaŭzon, eble ni estus malhelpintaj la rezultaton.

Pri kiuj rezultatoj ni zorgas? Memvideble, pri la malabundaj kolektitaj de ni je la fino de la lernojaroj. Ŝajnas, ke, tinek ni, nek niaj posteŭloj sukcesos iam. Tio estas tute certa. Sed, kial?

Meditante iomete pri la afero, ni tuj konkludas, ke la Movada celo estas akceptata de ĉiuj registaroj kaj unuopuloj konintaj ĝin, ke E-o estas ununura internacia lingvo kapabla solvi la komunikadan problemon je universala nivelo, ke ĝi estas la plej facil el la lingvoj parolataj hodiaŭ kaj ke ĉiuj konsentas pri la neceso fari ion seriozan por eviti la babelan nuntempan situacion.

Do, kial Esperanto antaŭeniras tiel malrapide? Evidentas, ke la oficialaj instancoj ne helpas financie la Movadon. Sed, kial? Eble, ĉar ni ne reprezentas ĝin dece? Ĉu ĉar dum ekonomia krizo malabundas la mono kaj, pro tio, hodiaŭ estas eĉ pli malfacile atingi subvenciojn de la Registaro? Miaflanke, opinias, ke ni suferas de ambaŭ malhelpoj. Kompreneble,kiu ajn rajtas malkonsenti kun mi se li havas objektivajn motivojn por tiel agadi.

Prterpasante ĉu unuj aŭ aliaj pravas estas memvideble, ke la Movado ne antaŭeniras se ni ne antaŭenpusas ĝin, forigante la monajn, tempajn kaj prestigajn limigojn. Tio estas la vera kerno de la afero. Multaj el ni ne havas tempon por labori efike ĉe la Movado, la financa aspekto de niaj grupoj kaj organizoj ne estas bon kaj la priesperanta kulturo de niaj samideanoj postulas tre gravaj penadojn flanke de ĉiuj.

Do kion fari? Tute simple. Deflankigi tiajn kaŭzojn antataŭigante ilin per la kontraŭaj. Konkrete mi sugestas jenon:

tempo: Ĉiu grupo devas kunveni por pritrakti:
ĝnojn pretajn labori.
lecon de tiuj personoj.
tempon por Esperanto de la volontuloj.
lanon por konkretaj personoj kaj tempoj.

Mono: Konite la agakplano, necesas kalkuli la probablajn els-
kazontaj por plenumi ĝin. Ĉi-cele mi atentigas vin pri:
brokotizoj.
istnaska Loterio.
oj.
ado da varoj.
enaj rajtoj, diplomoj...

prestiĝo: Ĉi tiu estas tikla afero. Iuj samideanoj opinias,
as paroli Esperanton por ke ĝi disvastiĝu. Mi opinias tute mal-
intelektularo atentas nin kiam ĝi konstatas ke gravaj kaj kle-
ze, gravaj ĉar kleraj) personoj enviciĝas en la Movado kaj ke
erantaj konoj de ĉi lastaj troviĝas ĝe la plej alta nivelo.

Aliflanke la homamaso hodiaŭ ne klopodas la studon de Es-
ar la kleruloj ne ŝatas ĝin prefere. Tio igas, ke, escepte de
nombro da samlandanoj, neniu estimas Zamenhofan lingvon. Tial
ofundigi kiel eble plej niajn konojn rilatajn al Internacia

Kiel? Tute simple. Studante la elementan, mezan kaj supe-
jn de ILEI -aŭ similajn- pri kiuj ties Hispana Sekciestro es-
anta senĉese per niaj esperantaj revuoj kaj oni diskutis am-
n la ĵus pasinta Andaluzia Kongreso de Esperanto en Malago.

Por plenumi tian celon, kompreneble, ne sufiĉas, ke iuj s
legas proprajn esperantaĵojn. Ciu grupo havu kiel eble plej
tukon da esperantaj revuoj kaj libroj je dispono de siaj mem-
tio, necesas ke la Grupoj estigu esperantan bibliotekon por
perantisto preta kapabligi je konkreta nivelo, povos konsulti
dajn tekstojn.

e fuŝu, do. Laboru respondece.

ANDRES MARTIN GONZALEZ

# PAĜO DE LA JUNULARO

1985 estas la Internacia Jaro de la Junularo, kaj sa-me la jaro kiam komencas agadi la ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO. En pasintaj numeroj de ĉi tiu revuo ni jam diskonigis niajn projektojn kaj revojn. Ĉi tiuj komencas realigi en 1985. Tiel, kiam jam estis aprobataj nia regularo de AEU kaj de HEJS, ni jam povas agadi.

En la venontaj numeroj de GA ne aperos ĉi tiu paĝo pri junularo, sed aparta folio, ĉu ni puvus nomi ĝin "revuo"?, kiu ha-vos la nomon NUN NI (NN). Ĉi tiu revueto, kiu estos la oficiala in-formilo de AEJ, aperos kvarfoje jare kune kun GA. Ni atendas ĉiesajn kunlaboradojn, ne pensu ke ĉi tiuj folioj estos altkvalitaj sed mo-desta revuo, gaja kaj amuza informilo por ĉiuj gejunuloj, la eldonkvanto estos 150 ekzempleroj; ni same uzos la verdan koloron kaj oni pre-sigos en Kordovo, kaj ne timu vi ricevos ĝin kune kun GA kaj ne kos-tos al vi pli da mono.

Same alia projekto, kiu tre baldaŭ realiĝos, estas la el-dono de informilo pri E-o, ĝi titoliĝos "Esperanto una lengua para los Jóvenes", kie oni informos pri la eblecoj lerni E-on kaj kiel aparte-ni al AEJ.

ATENCION

Nos han llegado numerosas cartas preguntando quién y có-mo se puede pertenecer a la AEJ. Desde aquí públicamente informamos que:

- pueden pertenecer a la AEJ todos los menores de 26 años que estén in-teresados en utilizar y difundir la lengua internacional Esperanto.
- Los jóvenes menores de 26 años que pertenezcan a la AEU, asociación de la que AEJ es sección juvenil, podrán pertenecer a ésta última si envian una carta así solicitándolo, no es necesario pagar cuota aparte, ya que se considera satisfecha si se ha pagado la de AEU.
- Los jóvenes menores de 26 años que no pertenezcan a la AEU, igualmen-te deberán solicitarlo por carta, y además pagar una pequeña cuota, que daremos a conocer en NUN NI nº1, no os preocupeis será muy asequi-ble.


ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO.
Apartado 611 14080 CORDOBA

AÑO INTERNACIONAL
DE LA JUVENTUD 1985

# AMUZAĴOJ

## ENIGMO

Casimiro, la vermo de nia biblioteko, ŝatas manĝi librojn. Hieraŭ ĝi komencis manĝi la unuan paĝon de libro kiu aperas sur la desegno kun la numero 1, kaj finis en la lasta paĝo de la libro 3. Ĝi ĉiam manĝas rekte, se ni scias ke la libroj havas 100 paĝojn, mezurante 10 cmoj, kaj ĉiu kovrilo mezuras 2 cmoj, kiom da cmoj manĝis hieraŭ nia vermo Casimiro?




Mezuroj:

Kovrilo: 2 cmoj.

100 paĝoj: 10 cmoj.

Ĉiuj libroj havas 100 paĝ.

## SOLVO DE LA PASINTA ENIGMO

Ni ricevis kelkajn leterojn, sed en la venonta numero aperos la solvantoj de la enigmo de Petro kaj la horloĝo. La solvo estas tre facila. Kaj ĝi same aperos en la numero 1/85, koraŭ vi povas partopreni en nia konkurso, sendu la solvon al ni kaj vi povos atingi tre belan esperanto-algluaĵon.

Ekde sia fondiĝo la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo asertis ke unu el siaj agadvojoj estus la studo de la riĉa historio de la Andaluzia E-Movado. Pro tio en la pasinta Malaga Kongreso oni kreis la Arĥivon de la AEU, kiu havos kiel siaj plej gravaj celoj enriĉiĝi pere de sia kolektado la studoj de la Andaluzia Esperantismo, kaj nomis al s-ano José María Rodríguez Hernández kiel arĥivestro.

La arĥivo jam ekfunkcias kaj eĉ kunlaboris kun kelkaj samideanoj pretaj por fari studojn pri la E-Movado. Ankoraŭ niaj etaj ŝrankoj estas meze malplenaj, ĉar tio kion la arĥivo posedas ankoraŭ ne estas sufiĉa; tamen ja ni devas danki ĉiujn kiuj pruntedonis al ni siajn Esperantaĵojn, kaj permesis al ni kopii gravajn foliojn aŭ belajn fotojn. Ekde ĉi tiu paĝo ni deziras peti al ĉiuj kunlaboron, se vi havas ion kio povas esti profita por la Historio de la Andaluzia E-Movado informu al ni, kaj se tio eblas vi fotokopios ĝin, kio estas tute komprenebla.

Nun la Arĥivo posedas Gazeto Andaluzia-n de 1910, bultenon eldonita en 1915 de la Germana Imperio por informi pri la Unua Mondmilito, propagandon de E-o de 1920, Kongreslibron de la Malaga Kongreso de 1959 kaj numeron de BOLETIN dediĉita al tiu Kongreso. Kaj komprenebl ni posedas la plej riĉajn informojn pri la nuntempa E-Movado en Andaluzio.

La adreso de la arĥivo estas:

Arĥivo de A.E.U.

Apartado 611

14080 CORDOBA

**LA ARĤIVO JAM EKFUNKCIAS!**

# poezio

Revmorte perforte pafmurdos
iu frenezo de l' nuna estinteco
kamaradojn dolĉajn niajn,
mordintajn la revo per penso de birdo
ĉar revoj kaj mevoj
eĉ rajtas la vojaĝon de l' ebleco.

Ne forlasu ni iam la memoron
pri CORDOBA de nia doloro,
pri sango kaj tero
kaj ploro kaj polvo,
pri l' penso kiu vinbero iĝos
pri l' vino kiu eblan solvon sentos
ĝis ni pro eksilento elvekiĝos.

(En nia civila milito kelkaj kordovaj samideanoj mortis, eksterlanda samideano dediĉis ~~ili~~ al ili ĉi kanton, kiu vi iufoje povos aŭdi kun bela muziko).

# Resumen Parcial

Estimado lector, se encuentra ud. en las últimas páginas de GAZETO ANDALUZIA correspondiente a 1984, por eso es nuestra obligación realizar un resumen parcial de nuestras actividades durante este año. Ante todo el equipo editor debe pedir perdón por la irregularidad en la aparición de las revistas, ya que, aunque en teoría se tratara de una publicación bimensual, muchos meses pasaron en blanco y es ahora en Junio de 1985 cuando aparece el último número de 1984. No intentaremos disculparnos diciendo que a veces Correos no funciona con la necesaria celeridad, ni argumentado que GA ha sido en este primer año una empresa con más sueños que posibilidades, ni justificarnos por la inmadura edad de la mayoría de los que colaboran en la edición, porque todo esto, aún siendo totalmente cierto, no dejaría de ser un acicate para todos los que desde el primer momento creímos en el proyecto. Sólo podremos decir que a pesar de todo el resultado es bien claro: 6 números (aunque en realidad hayan sido 5 con uno doble), numerosas opiniones vertidas, informes más o menos interesantes y noticias de los grupos esperantistas de Andalucía.

También en la vertiente económica hemos intentado salir adelante, la revista se ha autofinanciado con las suscripciones y con la ayuda de la AEU. Incluso nos ha permitido editar y enviar la revista con cierta calidad, reconocida públicamente en la reunión de redactores de revistas esperantistas celebrada en Sevilla en Julio de 1984 con ocasión del 44º Congreso Español. Y por último creemos que hemos sido útiles a todos los esperantistas, comenzando por los de nuestra tierra; así nuestro ideal de unión de todos los gesamideanoj de Andalucía ha sido evidente desde el primer momento, no sólo por medio de

esta pequeña publicación sino también desde la AEU.

Por eso hoy GAZETO ANDALUZIA (GA) alcanza su primer año. La revista seguirá editándose, a partir de ahora trimestralmente e intantará seguir siendo un vínculo de unión e información, y porqué no también de opinión, para todos uds. Van a cambiar algunas cosas, la primera el centro de edición que pasa del Grupo de Esperanto IB Sénena de Córdoba a D. Ricardo Felipe Albert-Reyna, samideano de Málaga a quien agradecemos su disponibilidad para seguir la edición. Cambiará también la regularidad, ya que la tend. en sus manos con más puntualidad y principalmante cambiarán también las colaboraciones que tienden a incrementarse.

Pero naturalmante, querido amigo lector, para ud. y con su ayuda hemos realizado esta revista, y ésta seguirá existiendo si ud. nos sigue apoyando por medio del envío de artículos y de la suscripción. Si quiere seguir recibiendo esta modesta publicación esperantista rellene y envíe la aliĝilo que se adjunta. Si lo hace sepa que está colaborando en un proyecto que nació hace 75 años, pero que aún sigue conservando toda su juventud, una realidad que se llama GAZETO ANDALUZIA que se publica en ESPERANTO y en la maravillosa tierra de ANDALUCIA.

Eldona Centro de GAZETO ANDALUZIA

Grupo de Esperanto IB "Séneca" CORDOBA

LIBROSERVO DE A.E.U. SERVICIO DE LIBROS DE A.E.U.

| | |
|---|---|
| - ¿Sabe Usted Esperanto? ................................ | 450,— Pts. |
| - La Tuta Esperanto ................................ | 300,— " |
| - Esperanto I ................................ | 400,— " |
| - Paŝoj al Plena Posedo ................................ | 725,— " |
| - Esperanto por infanoj ................................ | 220,— " |
| - Lexicón Sopena, Diccionario de bolsillo ........... | 330,— " |
| - Hamleto (traducido por L.L.Zamenhof) .............. | 500,— " |
| - Sferoj 1 (Ciencia ficción) ......................... | 650,— " |
| - Hechos fundamentales acerca de la la Lengua Intern. | 30,— " |
| - Memorandum del Club Europeo ........................ | 25,— " |
| - Porqué el Esperanto en un sistema de reconocimiento | 25,— " |
| - La Instruado de Esperanto laŭ la rekomendoj Unesko. | 35,— " |
| - Doctor, soy un pobre Diablo ........................ | 25,— " |
| - Esperanto, un tesoro educativo ignorado ........... | 25,— " |
| - Confesión de un loco europeo ....................... | 25,— " |
| - Postal del 2º Congreso Andaluz de Esperanto ....... | 15,— " |
| - Postal del 44 Congreso Español, Sevilla 1984 ...... | 15,— " |
| - Postal con motivo esperantista (I.L.E.I.) ......... | 15,— " |
| - Postal del 42 Congreso Español, Málaga 1982 ....... | 15,— " |
| - Postal del 9º Encuentro de HEJS, Málaga 1985 ...... | 15,— " |
| - Colección de Postales Chinas (10 postales) ........ | 50,— " |
| - Colección de Postales "Himno de la Kreitaro" ...... | 115,— " |
| - Pegatinas "Esperanto, idioma universal" ........... | 10,— " |
| - Pegatinas "Esperanto, lingvo de Paco" ............. | 10,— " |
| - Pegatinas "Esperanto, lingvo por universala komuni. | 10,— " |
| - Pegatinas "Mi ♥ Esperanton" ........................ | 50,— " |
| - Insignias de Esperanto (botón) ..................... | 60,— " |
| - Insignias de Esperanto (alfiler) ................... | 75,— " |
| - Llavero con emblema de Esperanto ................... | 175,— " |
| - Llavero del 40 Congreso Español de Esperanto ...... | 70,— " |
| - Prendedor de corbata con emblema de Esperanto ..... | 250,— " |
| - Insignia de Esperanto con texto "Esperanto parolata" | 185,— " |
| - Sellos del 39 Congreso Español de Esperanto ....... | 2,— " |
| - Tarjeta con matasellos del 65 Congreso Universal .. | 60,— " |
| - Tarjeta del Congreso de Budapest con sello y matas. | 50,— " |
| - Tarjeta del 40 Congreso Español de Esperanto ...... | 25,— " |
| - Tarjeta Filatélica del Congreso de Zaragoza ....... | 125,— " |
| - Sobre con matasello del Congreso en Madrid ........ | 50,— " |
| - Libro del 2º Congreso Andaluz, Málaga 1984 ........ | 75,— " |
| - Libro del 44 Congreso Español, Sevilla 1984 ....... | 75,— " |
| - Cartel del 44 Congreso Español de Esperanto ....... | 50,— " |
| - Bandolera de lona con dibujo esperantista (ILEI) .. | 200,— " |
| - Carpeta con motivo esperantista (ILEI) ............ | 300,— " |
| - Cinturones doble banda (blanca y verde) ........... | 150,— " |
| - Pegatina "Esperanto, el 2º idioma de cada pueblo" . | 10,— " |
| - Pegatina de la Asociación Sevillana de Esperanto .. | (Gratis) |
| - Sellos del Congreso Universal de Budapest ......... | 5,— " |

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

NOTA: PARA HACER LOS PEDIDOS DIRIGIRSE A: AEU SEVILLA, c/Pozo,3 41003

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Iremos ampliando la existencia de libros y material, si seguimos contando con tu colaboración. Si deseas algún libro que no aparezca en la relación, solicítalo y nosotros procuraremos conseguirlo.

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

N O V E D A D : Acaba de ser editado un libro en comics para aprender Esperanto como autodidacta. Se llama "Parolu E-on" con portada en color, tamaño 22 x 30 cm., 48 págs., editado por Tiempo de Ediciones,S.A., de Madrid, con motivo del Año Internacional de la Juventud. Autor: J.F.Arroy[o] Precio: 450,- ptas. Puedes pedirlo al libroservo de A.E.U.

I M P R E S O S

ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO
A. E. U.
CORDOBA
ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO

"GAZETO ANDALUZIA"

Dissenda Centro
C/ Sol 75

S E V I L L A - 3